

Javier Alcalde

Universitat Oberta de Catalunya, Barcelona

Kio okazis en la komunismaj landoj de meza kaj orienta Eŭropo?

Resumo: La unuaj klopodoj por revivigi la Esperanto-movadon post la dua mondmilito en centra kaj orienta Eŭropo renkontis multajn obstaklojn de la aŭtoritatoj. Tamen la subpremo ne estis absoluta en la komunista bloko; ĝi varias de lando al lando kaj dependas plejparte de ĉiu aŭtoritato. La morto de Stalin en 1953 ebligis eniri novan periodon por la esperantistoj. Laŭ pluraj kriterioj, la plej grava socia movado en tiuj landoj ĝis 1990 estis ĝuste la Esperanto-movado. Ekzistis pli da asocioj pri Esperanto ol asocioj pri homaj rajtoj, paco, medio, ktp. Krome la Esperanto-grupoj havis pli da internaciaj ligoj ol la aliaj. Kontraŭe, la 90aj jaroj vidis la disfalon de la Esperanto-movado en tiuj landoj, pro diversaj kialoj. Post sugesto de iuj hipotezoj tiurilate, la teksto finas emfazante la bezonon de plua esplorado en ĉi tiu studfako.

Ŝlosilvortoj: Esperanto; Esperanto-movado; Komunismo; Malvarma Milito; Sociaj movadoj.

What happened in the communist countries of Central and Eastern Europe?

Abstract: The first efforts to revive the Esperanto movement after the Second World War in central and eastern Europe encountered many obstacles on the part of the authorities. However, the repression was not absolute in the Communist bloc; it varies from country to country and depends largely on each authority. The death of Stalin in 1953 made it possible for the Esperantists to enter a new period. According to several criteria, the most important social movement in these countries until 1990 was precisely the Esperanto movement. There were more Esperanto associations than human rights associations, peace, environmental, etc. In addition, the Esperanto groups had more international connections than the others. Nevertheless, the 1990s saw the collapse of the Esperanto movement in these countries, for various reasons. After suggesting some hypotheses in this regard, the text concludes by emphasizing the need for further research in this field of study.

Keywords: Esperanto; Esperanto movement; Communism; Cold War; Social movements.

Que s'est-il passé dans les pays communistes d'Europe centrale et orientale ?

Résumé : Les premiers efforts pour relancer le mouvement espérantiste après la seconde guerre mondiale dans l'Europe centrale et orientale se sont heurtés à de nombreux obstacles de la part des autorités. Cependant, la répression n'était pas absolue dans le bloc communiste ; elle varie d'un pays à l'autre et dépend largement de chaque autorité. La mort de Staline en 1953 a permis aux espérantistes d'entrer dans une nouvelle période. Selon plusieurs critères, le mouvement social le plus important en ces pays jusqu'en 1990 était précisément l'espérantiste. Il y avait plus d'associations d'espéranto que d'associations sur les droits de l'homme, la paix, l'environnement, etc. De plus, les groupes d'espéranto avaient plus de connexions internationales que les autres. Pourtant, les années 1990 ont vu l'effondrement du mouvement espéranto dans ces pays, pour diverses raisons. Après avoir suggéré quelques hypothèses à cet égard, le texte conclut en faisant valoir la nécessité de poursuivre les recherches dans ce domaine d'étude.

Mots-clés : Espéranto; Mouvement espérantiste; Communisme; Guerre Froide; Mouvements sociaux.

Enkonduko¹

La temo de Esperanto dum la malvarma milito gravas mult-flanke, sed estas malmulte esplorata, aparte en la tiel nomataj *komunismaj landoj*. Temas pri landoj, kiujn oni kutime konsideras orienta Eŭropo, ĉar la ĉefa tiama divido estis inter Oriento kaj Okcidento. Tamen, geografie pluraj el ili situas en meza Eŭropo, koncepto kiu iĝis ofta germanlingve (*Mitteleuropa*) je la komenco de la XXa jarcento, kaj kiun lastatempe oni denove uzas por priparoli ilin.² Aliaj (ideologie) rilataj landoj situas for de tiu geografia areo, inkluzive de Sovetunio, sed ankaŭ Albanio kaj Jugoslavio en Balkanio, kaj pluraj landoj en aliaj kontinentoj. Kvankam ĉiuj el ili meritis priesploradon, ĉi tiu teksto celas specife Bulgarion, Hungarion, Pollandon kaj Ĉeĥoslovakion.

Ĉar mi esperantistiĝis en okcidenta Eŭropo post la malvarma milito, mia kono de la afero ne baziĝas sur propraj spertoj, sed legado kaj esplorado. Mia opinio la ĉefa referenco pri tiu temo (kaj pri aliaj) daŭre restas *La danĝera lingvo*. Krome, pluraj mallongaj tekstoj en la retejo de la esplorprojekto

1 Tiu ĉi esplora noto baziĝas sur prelego pri "la malfacila eliro de la Esperanto-movado en Orienta Eŭropo post la dua mondmilito" okazinta la 21-an majo 2021, kadre de mia akademia restado en Parizo kiel vizitanta profesoro en École des hautes études en sciences sociales. Vidu <https://www.ehess.fr/fr/personne/javier-alcalde-0>

2 Kaplan (2013: 34-36) faras similan konstaton.

Militrakonto pritraktas interesajn erojn kaj homojn en tiuj landoj.³ Ankaŭ utilas multaj rakontoj de ĉefroluloj en tiu historio, kaj fikciaj, kaj nefikciaj, kiel tiuj pri Germanio de Detlev Blanke (interalie 2004) kaj pri Sovetio de Mikaelo Bronŝtein (1992, 2016 kaj 2017).⁴ Kaj ekzistas esplorindaj materialoj en diversaj arkivoj disigitaj en pluraj landoj.⁵

Eblas dividi la historian fadenon laŭ tri periodoj. Tiel la unua turnopunkto estus 1953, mortojaro de Stalin; kaj la dua 1989, pro la falo de la Berlina muro.⁶ En ĉiu periodo substrekindas malsamaj esplordemandoj.

Unua periodo (1945-1953)

Ĝenerale post la dua mondmilito la bonfarto de Esperantistoj dependis de la politika kunteksto en ĉiu lando. Tial, la unuaj klopodoj revivigi la movadon alfrontis multajn obstaklojn de la aŭtoritatuloj. La malnovaj laboristaj esperantistoj, kiuj multe suferis dum la nazia periodo, estis aparte ŝokitaj de tiuj malfacilaĵoj.

Kio instigis la reĝimojn limigi aŭ eĉ malpermesi la disvastigon de Esperanto? Respondas Lins: Hejmlanda sekureco. Tio estas, la sama timo pri eksterlanda korespondado kaj aliaj neregeblaj kontaktoj, kiel en 1937/38 en Sovetunio kaj en 1941 en la baltaj ŝtatoj. Esperantistoj estis denove akuzataj: “cionistoj kaj kosmopolitoj.” Tamen, la subpremo de Esperanto ne estis absoluta en la komunista bloko; ĝi variis de lando al lando kaj grandparte dependis de ĉiu aŭtoritatulo.

En Hungario, ekzemple, oni sukcesis igi Esperanton nedeviga fako en elementaj lernejoj en 1948. Kaj 104 parlamentanoj (34 komunistoj) subtenis similan politikon en mezlernejoj. Eĉ Mátyás Rákosi, la estro de la partio, deklaris publike ke li mem lernis Esperanton. Tamen la evoluo de la movado paralelis la stalinisman elpurigon de la partio. Tiel Literatura Mondo, relanĉita en 1947, ĉesis aperi en 1950, oficiale „pro financaj obstakloj”. Ankaŭ en 1950 Hungara Esperantisto ĉesis aperi. En 1951, ĉiuj Esperanto-periodaĵoj en Ĉeĥoslovakio devis ĉesi publikigon. Intertempe, en 1950 okazis lingva

3 Vidu ekzemple Alcalde (2018) pri Aleksander Metodiev Nakov, Goussef (2019) pri Ada Sikorska-Fighiera kaj Dubourg-Glatigny (2020) pri Maria Paulina (Marja) Orsetti.

4 Ankaŭ en la retejo de Andreas Künzli troveblas abunda materialo, el persona perspektivo kaj verkstilo. Vidu <http://www.plansprachen.ch/>

5 Krom Vieno, Roterdamo, Subirats kaj ĉiuj aliaj esperantaj kolektoj, menciindas diversaj personaj kaj familiaj arkivoj. Ekzemple tiu pri la dokumentoj kolektitaj de Detlev kaj Wera Blanke konsulteblaj en Berlino. Vidu <http://www.argus.bstu.bundesarchiv.de/ny4604/index.htm>

6 Aliaj aŭtoroj preferas uzi la jaron 1991 por marki la finon de la malvarma milito. En la kadro de tiu ĉi teksto, tiuj detaloj ne gravas, kaj mi konsideras la periodon 1989-1991 kiel sama momento de la Historio.

diskutado en la paĝoj de Pravda, kie Stalin kondamnis la lingvajn teoriojn de Marr. Sekve, la esperantistoj devis sindediĉi al la konstruado de socialismo. El lingva perspektivo, tio signifis fokusiĝi pri la antaŭenigo de la rusa lingvo. Alivorte, Esperanto restis malamata (okazis eĉ arestoj kaj maldungoj) pro politikaj kialoj.

Dua periodo (1953-1990)

La morto de Stalin en 1953 helpis transiri al nova periodo, pli pozitiva por la esperantistoj.⁷ Tiun jaron kreiĝis Mondpaca Esperantista Movado, internacia pacifisma asocio, ofte kontrolata de la komunismaj reĝimoj. Kaj en la sekvaj jardekoj elstaris Bulgara Esperanto-Teatro, kiu kutimis sursceneĝi en internaciaj renkontiĝoj.

Esplorante pri tiu periodo (ekde la kvindekaj jaroj ĝis la naŭdekaj jaroj), mi interesiĝis pri du fakaj verkoj de la bulgara sociologistino Ana Velitchkova (2010 & 2014), eble ĉar mi mem doktoriĝis pri sociaj sciencoj. Malgraŭ tio, ke ŝiaj verkoj enhavas pripensigajn ideojn kaj nekonatajn datumojn pri la Esperanto-movado en pluraj landoj (ne nur Bulgario), oni malofte mencias ilin en Esperantujo.

Verŝajne tio ŝuldas al la fakto, ke Velitchkova esploris el ekstere (t.e. ŝi ne estas esperantisto), kaj nur lernetis la lingvon por fari sian esploron. Foje esperantistoj malestimas tiajn esploristojn, ĉar laŭ onidiro ili malfacile sukcesas kompreni la esencajn trajtojn de nia movado, kaj finfine ili verkas banalaĵojn enkadritajn en faka ĵargono. Parte tiu kritiko ŝajnas al mi justa, sed parte ĝi estas antaŭjuĝo. Ne malofte, kiam oni superas tiajn antaŭjuĝojn eblas malkovri interesajn rezultojn. Krom kelkaj evidentaj limigoj, interalie metodologiaj, Velitchkova plurflanke kontribuis al la faka literaturo.

Kial ŝi decidis studi la esperantistojn? Ĉar ŝi volis esplori la plej signifan socian movadon en Orienta Eŭropo dum la komunisma periodo. Post analizo de kompleta datumbazo pri sociaj movadoj en la mondo inter 1953 kaj 2003 (Smith & Wiest, 2012),⁸ ŝi konkludis ke laŭ malsamaj kriterioj la plej grava en tiuj landoj estis ĝuste la Esperanto-movado. Ĝis la naŭdekaj jaroj ekzistis tie multe pli da Esperanto-asocioj ol asocioj pri homaj rajtoj, paco, medio ktp. Krome, la Esperanto-grupoj havis pli da internaciaj ligoj ol la aliaj. Jen la unua kontribuo de Velitchkova al la historiografio pri Esperanto.

Kompreneble, kondiĉo de tiu esperanta florado estis la apogo de la komunismaj reĝimoj. Pri la kialoj de tiu apogo mankas tamen sistema

7 Indus ankaŭ konsideri la eblan influon en tiu periodo de la UNESKO-Rezolucio IV.1.4.422 pri Esperanto, akceptita en 1954 en Montevideo. Mi dankas al Mauro Viader pro la sugesto.

8 Ĝi inkluzivas 301 variablojn, prenitajn de *Yearbook of International Organizations*.

esploro, eblas nur hipotezi. Ĉu la reĝimoj uzis la Esperanto-movadon por kontroli iliajn civitanojn? Ĉu ili subtenis ĝin ĉar ili trovis similaĵojn inter sia komunisma kaj porpaca idearo/propagando kaj la valoroj ligataj al Esperanto? En sia doktoriĝa tezo Velitchkova emfazis la kamaradecan kaj amikeman etoson de la Esperanto-movado, kiu laŭ ŝi ludis rolon eĉ en la paca kaj rapida transiro al la demokratio en Bulgario. Sen nei tion, tiu parto de ŝia esploro ŝajnis al mi malpli konvinka.

Dua empiria trovo de Velitchkova estas la regula kreskiĝo de la Esperanto-movado ĝis la naŭdekaj jaroj (vidu la figuron sube). Turnopunktoj estis 1968 (ekzemple en Ĉeĥoslovakio) kaj 1975 pro la Helsinka Interkonsento.⁹ Tiu intereso pri Esperanto de la centraj kaj orientaj Eŭropanoj okazis samtempe al mildigo de la diktaturoj, kiel montras la evoluo de libroeldonado en Hungario. Laŭ Vilmos Benczik (2014), inter 1976 kaj 1990 Hungara Esperanto-Asocio publikigis 138 librojn en / pri Esperanto kaj vendis 368.948 ekzemplerojn.

Pri tiu dua periodo, pluraj datumoj de la verkoj de Velitchkova frapas. En 1988 estis 57 Esperanto-grupoj en Orienta Eŭropo; tio signifas 23,08% de ĉiuj asocioj en tiuj landoj. Kompare, la asocioj pri homaj rajtoj estis 11,74%, pri paco 10,53%, pri medio 10,53%, pri virinoj 6,07%. Ne hazarde, la tri ĉefaj UK okazis en Pollando (Varsovio 1987, kun 5946 partoprenantojn), Hungario (Budapeŝto 1983, 4834 partoprenantojn) kaj Bulgario (Varna 1978, 4414 partoprenantojn). En 1988, la landoj kun pli da membroj en UEA estis Pollando (9332), Bulgario (5215), Hungario (3706) kaj Ĉeĥoslovakio (3637).¹⁰ Fakte, en tiuj landoj oni kutimis koni persone membron de UEA. Laŭ la kalkulo de Velitchkova, 15,55% de la bulgarioj konis iun membron de UEA; same okazis en Hungario (9,66%), Pollando (6,88%) kaj Ĉeĥoslovakio (6,66%). Kaj certe estis aliaj esperantistoj, kiuj ne membris en UEA, sed simile famiĝis inter siaj samlandanoj. Velitchkova argumentas, ke pro tio ke ne ekzistis alia komunika kanalo kun la Okcidenta bloko, esperantistoj estis prestiĝaj homoj, kiuj fieris montri ricevitajn korespondadon, tiel ke ĉiuj iliaj konatoj sciis pri ilia esperantisteco.

El tiu perspektivo, se la Esperanto-movado estis tiom grava dum la komunisma periodo, malfacilas kompreni, kial ne ekzistas en ĉiu universitato en Pollando, Bulgario, Hungario, Slovakio aŭ Ĉeĥio aparta fakto prie. Ĉu oni iam starigos ĝin?

9 La Helsinka Interkonsento (oficiala Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaborado en Eŭropo) okazis en Helsinko (Finnlando) inter 1973 kaj 1975. Ĝi signifis malpliigon da streĉoj inter la du flankoj de la malvarma milito, kaj pli da atento al la homaj rajtoj en la komunismaj landoj. Ne hazarde, la internacia ne registara organizaĵo Human Rights Watch estis kreita sekve de ĝi.

10 Tiuj grandaj nombroj sentiĝis ankaŭ en la komitato de UEA, kie la multaj reprezentantoj de tiuj landoj foje kunordigis siajn poziciojn.

Tria periodo (post 1990)

Kiel sciante, la naŭdekaj jaroj vidis la kolapson de la Esperanto-movado en la komunismaj landoj. Jen fascina esplordemando: Kial tio okazis? Denove mankas sistema esploro, kaj eblas nur hipotezi.

- (a) En la nova (kaj pli libera) kunteksto, la homoj el tiuj landoj ne plu dependis de Esperanto por vojaĝi, ĉar ili kapablis havi internaciajn kontaktojn alimaniere. Alivorte, *Esperanto ne plu necesis*.
- (b) La ekonomia krizo signifis la finon de publika financado por la Esperanto-movado (ekzemple en Bulgario oni maldungis kvardekon da profesiaj esperantistoj). *La esperantistoj perdis siajn rimedojn*.
- (c) Esperanto en tiuj landoj estis tiel ligata al komunismo, ke kiam alvenis kontraŭkomunisma ondo, tiu ankaŭ implicis kontraŭesperantan agadon. En la nova periodo *Esperanto akiris negativan prestiĝon*.¹¹
- (d) Dum la malvarma milito Esperanto permesis iugrade superi la malamikajn rilatojn inter la du geopolitikaj blokoj, perante transnaciajn ligojn el homo al homo. *La postmilita kunteksto ne bezonis tian pacisman interkomprenigilon*.¹²
- (e) La fino de la malvarma milito estis komprenita ankaŭ kiel la fino de la Historio, laŭ la esprimo de Fukuyama (1992).¹³ Kapitalismo venkis, inkluzive de ĝia lingvo, kiu fariĝis la tutmonda lingvo. *La ideo de internacia lingvo ne plu havis sencon*.

Taŭga respondo probable kombinus la kvin elementojn, laŭ malsama relativa pezo en ĉiu lando.

Rilate al tiu kolapso, indas tamen ne forgesi, ke eĉ nun tiuj landoj el meza kaj orienta Eŭropo daŭre gravas por la Esperanto-movado: Tie naskiĝis la Internacia Lingvo. La oficiala institucio atestanta la Esperanto-ekzamenojn laŭ la Komuna Referenca Kadro de EU restas la Universitato de Budapeŝto. En Poznań (Pollando) funkcias programo pri interlingvistikaj studoj. Dume, slovakaj esperantistoj sukcesis progresigi la movadon en Slovakio kaj sam-

11 En la verkoj de Velitchkova estas interesaj intervjuoj tiurilate.

12 Tiu pacifisma hipotezo ŝajnas simila al hipotezo (a), sed esence malsamas, ĉar temas pri tutmonda afero, kiu ne nur ligiĝas al la komunisma bloko. Kiel videblas en la figuro sube, la simila evoluo de la kvanto de Esperanto-grupoj en landoj okcidentaj kiel Svedio kaj Usono, kaj en (tielnomataj) orientaj kiel Pollando aŭ Bulgario sugestas, ke dum la malvarma milito Esperanto funkciis kiel pacisma ilo por alproskimigi homojn el la du blokoj. Tiel hipotezo (d) - same kiel hipotezo (e) - parte klarigeblus ankaŭ la negativa evoluo en la okcidentaj landoj dum la naŭdekaj jaroj de la pasinta jarcento.

13 En tiu influa libro la aŭtoro argumentas, ke post la malvarma milito alvenis la fino de la ideologia evoluo de la homaro per la universaligo de la okcidenta liberala demokratio kiel fina formo de homa registaro.

tempe fariĝis pli influa internacie, interalie pro daŭra kunlaborado kun UEA. Krome, en la ekstera mondo la politika kunteksto ŝanĝiĝis. Se Usono daŭre perdos influon, eblas ke simile ĝia lingvo perdos influon. La mondo turnas sin orienten, kvankam ĝi ne nepre estos pli demokrata - laŭ la nunaj registaroj de la BRICS-landoj. Resume, malgraŭ la prognozo de Fukuyama, la estonto daŭre konstruiĝas; ĉefe en epoko de eksterordinaraj kaj ne antaŭvideblaj ŝanĝoj, teknologiaj (kaj ne nur), ĝi simple ne sciatas.

Konklude

Kontraŭfakta aliro permesas al ni imagi alternativan historion. Kio okazintus se la malvarma milito ne finiĝus en 1989-91? Ĉu la Esperanto-movado estus daŭriganta sian eksterordinaran evoluon en tiuj (kaj aliaj) landoj (vidu la figuron sur p. 72, prenitan de Velitchkova)? Ĉu ĝi sukcesus havi pozitivan efikon trans la komunisma bloko? Malfacilas tion scii. Sed ja eblas esplori la komunisman epokon en tiuj landoj.


La studo de la Esperanto-movado povas kontribui mult-flanke al la historiografio de meza kaj orienta Eŭropo. Ampleksa korpuso ekzistanta en la malsamaj arkivoj restas ne esplorita. Ekzemple, en ŝia doktoriĝa tezo Velitchkova detale analizis nur la revuon Bulgara Esperantisto en 1946 kaj 1947. Mi imagas ke pro lingvaj malfacilaĵoj ŝi ne analizis aliajn jarojn kaj aliajn revuojn, kio neprus por havi komparan perspektivon.¹⁴ Fakte, la ekzisto de Esperanto-grupoj en multaj landoj ebligas unikan komparan esploradon pri la disvolviĝo de komunismaj reĝimoj, kaj pri kiel oni spertis ilin en diversaj landoj.

El historiografia perspektivo, ni havas aldonan privilegian esplorsituacion. Kiam mi esploris pri Esperanto kaj la unua mondmilito, krom escepto ne eblis trovi homojn kiuj travivis ĝin.¹⁵ Pri la hispana milito (1936-39) kaj pri la dua mondmilito mi sukcesis fari manplenen da intervjuoj.¹⁶ Kontraŭe, multaj el la esperantistoj, kiuj aktivis en la sepdekaj kaj okdekaj jaroj de la pasinta jarcento en tiuj landoj de meza kaj orienta Eŭropo ankoraŭ vivas. Endus intervui ilin. Kiu emus kunlabori en tia projekto?

14 Kurioze Velitchkova dediĉis sufiĉe da spaco al eternaj komencantoj. Laŭ ŝia argumento, esperantistoj marĝenas la homojn, kiuj lernas la lingvon malrapide.

15 La sola homo estis Eduardo Larrouy (1913-2020). Vidu Alcalde (2020a).

16 Vidu ekzemple Alcalde (2020b) pri Mario Candotto (nask. 1926).



Figures 4.6: Number of transnational Esperanto organizations by country, 1953-2003 (Smith and Wiest 2012b).

Bibliografio

- Alcalde, J. (2018). Anarkiismo en Bulgario. *Militrakonto*, <https://mondmilito.hypotheses.org/972>
- Alcalde, J. (2020a). Eŭsko per socialismo. *Militrakonto*, <https://mondmilito.hypotheses.org/3725>
- Alcalde, J. (2020b). De Dachau ĝis Placo Fontano. *Militrakonto*, <https://mondmilito.hypotheses.org/4109>
- Alcalde, J. & Salguero, J. M. (2018). *Antaŭ unu jarcento. Esperanto kaj la granda milito* (SAT-EFK, 2018).
- Benczik, V. (2014). Libroeldonado sen mitoj. *La Ondo de Esperanto*, 2014/7(237).

- Blanke, D. (2004). *Esperanto kaj Socialismo?* New York: Mondial.
- Bronštejn, M. (1992). *Legendoj pri SEJM*. Moscow: Impeto.
- Bronštejn, M. (2016). *Mi stelojn jungis al revado*. Moscow: Impeto.
- Bronštejn, M. (2017). *Sortoj frakasitaj*. Moscow: Impeto.
- Dubourg-Glatigny, P. (2020). Kodnomo Edward Godwin. *Militrakonto*, <https://mondmilito.hypotheses.org/3824>
- Fukuyama, F. (1992). *The End of History and the Last Man*. New York: Free Press.
- Goussef, C. (2019). Poloj deportitaj. *Militrakonto*, <https://mondmilito.hypotheses.org/2319>
- Kaplan, R. (2013). *The Revenge of Geography: What the Map Tells Us About Coming Conflicts and the Battle Against Fate*. New York: Random House.
- Smith, J. & Wiest, D. (2012). *Transnational Social Movement Organization Dataset, 1953-2003*. Inter-university Consortium for Political and Social Research, www.icpsr.umich.edu/web/ICPSR/studies/33863/
- Velitchkova, A. (2010). *Cosmopolitan Priming for Change: Transnational Social Movements in Communist Eastern Europe*. Master's Dissertation, University of Notre Dame.
- Velitchkova, A. (2014). *Esperanto, Civility, and the Politics of Fellowship: A Cosmopolitan Movement from the Eastern European Periphery*. PhD Dissertation, University of Notre Dame.

Pri la aŭtoro

Javier Alcalde instruas pri politikaj sciencoj kaj internaciaj rilatoj ĉe Universitat Autònoma de Barcelona kaj Universitat Oberta de Catalunya. Pri la historio de la Esperanto-movado li publikigis dekon da ĉapitroj kaj artikoloj en fakaj revuoj, kaj kunredaktoris kun José María Salguero *Antaŭ unu jarcento. Esperanto kaj la granda milito* (SAT-EFK, 2018).

Retadreso: jalcaldevi@uoc.edu

ORCID-numero: 0000-0001-6050-783X

About the author

Javier Alcalde teaches political science and international relations at the Universitat Autònoma de Barcelona and Universitat Oberta de Catalunya. He has published a dozen chapters and journal articles on the history of the Esperanto movement, and co-edited with José María Salguero *Antaŭ unu jarcento. Esperanto kaj la granda milito* (SAT-EFK, 2018).

À propos de l’auteur

Javier Alcalde enseigne les sciences politiques et les relations internationales à l’Universitat Autònoma de Barcelona et à l’Universitat Oberta de Catalunya. Il a publié une douzaine de chapitres et d’articles sur l’histoire du mouvement espérantiste dans des revues spécialisées et a co-édité avec José María Salguero *Antaŭ unu jarcento. Esperanto kaj la granda milito* (SAT-EFK, 2018).